

Brno, urbo de nia asocia kongreso

Brno estis fondita en 1243, kiam ĝi ricevis urbajn rajtojn. Ĝi situas inter la riveroj Svratka kaj Svitava.

En 1645 la urbon sieĝis svedoj, sed sensukcese, kaj tiel Brno savis Vienon, ĉar svedoj ne povis ĝin ataki, havante ne konkeritan urbon post la dorso. Tio firmigis la pozicion de Brno kiel ĉefurbon de Moravio. En 1805 apud Brno furiozis batalo de tri imperiestroj ĉe Aŭsterlico, ĉeĥe Slavkov, kiun majstre priskribis Leo Tolstoj en la romano *Milito kaj paco*.

Nun la urbo havas 400 mil loĝantojn kaj aliaj 100 mil homoj ĉiutage venas labori. En Brno havas sian sidejon la Konstitucia Tribunalo kaj la Supera Tribunalo.

La plej allogaj vidindaĵoj en Brno estas la burgo Špilberk, katedralo de sanktaj Petro kaj Paŭlo sur la monteto Petrov, vilao Tugendhardt, la digolago kaj proksime de ĝi zoologia ĝardeno kaj burgo Veverí. En la urbo estas pluraj muzeoj, Moravia Landa Muzeo, Teknika Muzeo, Mendel-muzeo kaj eble plej multe vizitata muzeo Anthropos kun figuro de mamuto, kopioj de prahomaj desegnaĵoj el la franca groto Lascaux kaj multaj pentraĵoj de Zdeněk Burian pri la praepoko.

Ĉe la kapucena preĝejo kaj ĉe la preĝejo de Sankta Jakobo estas vizitindaj ostejoj. En la urbo troviĝas pluraj aliaj preĝejoj, franciskana, dominikana, de sankta Tomaso k.a. La plej gravaj placoj estas la Moravia, la Legoma Foiro, La Dominikana kaj en la centro la placo de Libereco. Al ĝi dominas la kontraŭpesta kolono, sed nun pli allogas la atenton speciala moderna horloĝo en formo de

kuglo. La placo nomata Legoma Foiro estas iom dekliva, kutime plenplena de standoj de legomvendistoj, en ĝia centro staras fontano kun statuoj kaj dekstre videblas la turo de la malnova urbo-domo. En ĝia trairejo pendas de la plafono remburita krokodilo kaj sur la muro granda rado, kiun laŭ legendo el la 17-a jarcento dum unu tago kreis radfaristo en Lednice kaj sukcesis ĝin alruli al Brno antaŭ la fermo de urbaj pordegoj.

Proksime la placon de Komenio ĉirkaŭas la ruĝa preĝejo, Masaryk-universitato, Janáček-akademio kaj la kulturdomo *Besední dům*, kie en 1969 estis fondita Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Nun ĝi estas sidejo de filharmonio de Brno.



En la urbo estas pluraj teatroj (de Janáček, Mahen, fratoj Mrštík, Reduta, por infanoj Radost kaj Polárka), kinejoj, galerioj.

En 2007 la loka Esperanto-klubo sukcesis kunlabore kun la magistrato eldoni flugfolion pri la urbaj vidindaĵoj (elŝutebla nun ĉe la kluba retejo): http://esperantobrna.cz/malnova/smer_esp.pdf.

-mm-